WIKIPEDIA

Ajmara lingvo

Ajmara Lingvo estas parolata lingvo de ajmaroj en Bolivio, Peruo (oficiala lingvo), Nordo de Ĉilio kaj montara nordokcidenta regiono de Argentino. Tre vigla lingvo en la sudamerika montara regiono, kun radi-elsendoj, en komputiko[1], ktp. Estis la popola lingvo de Inkaa imperio (la "nobla" estis la Keĉua).

Ajmara	
Parolata en	Bolivio, Peruo, Ĉilio (nordo)
Parolantoj	4 000 000
Denaskaj parolantoj	2.200.000
Skribo	latina
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Peruo
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ay
ISO 639-2	aym
ISO 639-3	aym
Glottolog	nucl1667
Angla nomo	Aymara
Franca nomo	aymara
Vikipedio	

Enhavo

Ecoj
- Fonetiko
  - Vokaloj
  - Konsonantoj

Referencoj

Eksteraj ligiloj

Ecoj

La ajmara estas forte aglutina lingvo. Ĝi ne konas artikolon. Ĝia vortaro estas tre riĉa. Ekzistas ekzemple cento da vortoj por la verbo *porti*, depende de tio, kion oni portas. La plimulto de la substantivoj havas diversajn formojn, depende de la "certeco". Ekzemple en la frazoj "Mi vidas ĉevalon", "Mi kredas, ke mi vidas ĉevalon" kaj "Li diras, ke li vidas ĉevalon" la vorto "ĉevalo" estas tradukita laŭ 3 diversaj manieroj.



Geografia distribuo de ajmara lingvo

Fonetiko

Vokaloj

Kiel la keĉua kaj araba lingvoj la ajmara konas nur tri vokalojn (*a*, *i*, *u*). Ekzistas longigitaj vokaloj, reprezentataj kun dierezo super si; do skribe ekzistas jenaj ses vokaloj: *a*, *ä*, *i*, *ï*, *u*, *ü*. Menciindas ankaŭ, ke antaŭ uvula konsonanto (*q*, *q'*, *qh*, *x*) vokalo *i* iĝas */e/* kaj vokalo *u* iĝas */o/*. Ekzistas diftongoj formitaj per *y* (= "j") kaj *w* (= ŭ).

Konsonantoj

La ajmara havas 16 konsonantojn, sed kalkulante variantojn de la plozivoj oni atingas 26:

	lipa	**gingiva**	**palata**	**vela**	**uvula**

plozivo	p	t	ch	k	q
frikativo		s		j	x
lateralo		l	ll		
trilo		r			
nazalo	m	n	ñ		
glitanto (duonkonsonanto)	w		y		

Ĉe la plozivaj konsonantoj ne ekzistas voĉaj formoj kiaj *b*, *d* aŭ *g* . Tamen ekzistas tri formoj de frikativaj konsonantoj: simplaj, velaraj kaj aspiraciaj.

simpla	velara	aspiracia
p	p'	ph
t	t'	th
ch	ch'	chh
k	k'	kh
q	q'	qh

Referencoj

1. ↑ *La ajmara kiel komputila lingvo*, Monato, 1986/08-09, p. 21.

Eksteraj ligiloj

- hispane Pri la ajmara (http://www.aymara.org)
- kurso pri la ajmara lingvo (en hispana lingvo) (http://www.ilcanet.org/publicaciones/pdf_compendio.html)
- granda ajmara/hispana bildvortaro (http://portal.perueduca.edu.pe/Docentes/xtras/pdf/dicc_aymara.pdf)
- esperante La ajmara kiel komputila lingvo, Manuel Halvelik, Internacia Komputado, 1985 (8) p 17.

Lingvo

Lingvistiko • Interlingvistiko • Planlingvo • Lingvaj familioj • Lingva filono • Senparenca lingvo

Listoj alfabetorde • laŭ ISO 639 • laŭ familio • laŭ parolantaro • laŭ skribsistemo

Diverslingve nombroj • Saluti • danki • idiotismo kaj idiotismaj esprimoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Ajmara_lingvo&oldid=6717111"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:31, 10 sep. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.